

## Schlussfolgerungen zu L.L. Zamenhof

Zunächst ist festzuhalten, dass die Ideen L.L. Zamenhofs (Esperanto und Hillelismus/Homaranismus) aufgrund zweier Hauptquellen offenbart und formuliert wurden:

Einerseits bezieht sich die linguistische Quelle auf das ‚Unua Libro‘ des Jahres 1887, in dem Esperanto von L.L. Zamenhof als Projekt im Rahmen der Universalsprachenfrage vorgestellt wurde. Im Sinne der seit Jahrhunderten diskutierten Weltsprachenidee schuf Zamenhof ein originelles und reales Idiom, dessen Funktion er als neutrale zwischenethnische Zweitsprache neben den nationalen Sprachen definierte, mit dem Ziel, sie als Kommunikationsbrücke zwischen den Völkern zum Einsatz kommen zu lassen.

Die zweite, ideologische Quelle umfasst den ‚Hillelismus‘, wie er 1901 von Zamenhof im Kontext der Zionismus-Debatte als Analyse der ‚Judenfrage‘ und als möglicher Beitrag zu ihrer Lösung formuliert und in den nachfolgenden Jahren zum ‚Homaranismus‘ in der Gestalt eines universellen ethischen Programms umfunktionierte. Mit dem Homaranismus wollte Zamenhof eine „neutral-menschliche“ Grundlage in moralischer, ethischer und religiöser Hinsicht schaffen.

Beide Quellen können wissenschaftlich und pragmatisch zwar unabhängig voneinander behandelt und analysiert werden, sind ideell und genetisch im Grunde aber als kohärentes Gesamtkonzept nicht voneinander zu trennen.

Unmittelbarer Entstehungshintergrund des Esperanto und des Hillelismus war die komplizierte politische, soziale, ethische, religiöse und kulturelle Lage im Russischen Imperium und im Gebiet des ehemaligen Polnisch-Litauischen Doppelreichs, das zur Zeit Zamenhofs weitgehend vom Zarenreich besetzt war.

Motive und Wurzeln des Esperanto und des Homaranismus sind also im jüdischen Milieu Zamenhofs zu suchen und zu finden. Zamenhofs Judentum ist unmittelbare Ursache und Voraussetzung für die Schaffung einer neutralen Sprache und einer neutralen Religion (oder Ethik, Moral). Ohne die Existenz und ohne die Erörterung der ‚Judenfrage‘ wäre Zamenhof in seiner Phase als Zionist nicht auf die Idee gekommen, den Juden eine neutrale Sprache zu geben, dies betrifft ebenso die Errichtung einer alternativen Religionsethik in der Form des Hillelismus. Die entsprechenden Zitate, die das Judentum für die Schaffung des Esperanto und des Hillelismus als Grundlage und Hauptmotiv unmissverständlich ausweisen, wurden in der Biographie kontextual ausführlich dargestellt. Wir erinnern uns an den Satz Zamenhofs in seinem Brief vom 21.2.1905 an Alfred Michaux, dass sein Judentum der Hauptgrund war, weshalb er sich von seiner frühesten Kindheit an einer so wesentlichen Idee und einem Traum hingegeben habe – dem Traum der Vereinigung der Menschheit. Diese Idee sei das Wesen und das Ziel seines ganzen Lebens. Diese Absicht wird stellvertretend für andere diesbezügliche Aussagen auch im Brief Zamenhofs vom 10.3.1907 an Edward Baff (1888–1964), dem Gründer der Esperanto-Vereine in Worcester (Massachusetts), Washington und Los Angeles, unterstrichen, in dem es heisst:

„Ich war stets der Meinung, dass die Juden mehr als alle andere eine neutrale Sprache brauchen, denn alle bestehenden Sprachen sind für sie ganz fremd, während die alte hebräische Sprache nur verhältnismässig wenige Juden benutzen... Ich versichere Ihnen, dass Esperanto dem jüdischen Volk einen unschätzbaren Dienst erweisen wird.“ Nicht zu unterschätzen ist in diesem Zusammenhang der Effekt der jiddischen Grammatik als Transmissionsriemen für die Arbeit Zamenhofs an der internationalen Plansprache Esperanto.

Nicht nur zeitgleich ist Zamenhofs ‚Hillelismus‘ von 1901 im Kontext der damals veröffentlichten zionistischen Elaborate und Programme (wie v.a. Pinskers ‚Autoemancipation‘ von 1882 und Herzls ‚Judenstaat‘ von 1896) entstanden. Man darf auch vermuten, dass Zamenhofs Traktat von ihnen beeinflusst wurde, denn die Analyse der ‚Judenfrage‘, die von diesen Autoren vorgenommen wurde, weist inhaltlich teilweise eine hohe Kongruenz mit Zamenhofs ‚Hillelismus‘ von 1901 auf, obwohl die einzelnen Verfasser zu verschiedenen Schlussfolgerungen gelangten.

Nicht zuletzt weil Zamenhof dies selbst empfohlen hatte, sollten die Propagandisten des Esperanto wegen des damals grassierenden Antisemitismus selbst darauf verzichten, das Judentum Zamenhofs im Entstehungsprozess des Esperanto und des Hillelismus/Homaranismus in den Vordergrund zu stellen,

um der Verbreitung des Esperanto nicht zu schaden. Diese quasi-Verleugnung des Judentums Zamenhofs bei der Verbreitung des Esperanto und des Homaranismus zeitigte verheerende Folgen: Das Judentum Zamenhofs wurde in Esperanto-Kreisen weitgehend vernachlässigt, ja sogar verschwiegen, mit tabuisierenden Auswirkungen bis in die jüngste Zeit (so fehlt z.B. ein Hinweis auf Zamenhofs Judentum in der Resolution zum 94. Esperanto-Weltkongress in Białystok im Zamenhof-Jubiläumsjahr 2009). Der Hillelismus von 1901 erwies sich für die Zionisten, Esperantisten und nicht zuletzt für die Juden und die Bürger Israels als unbrauchbare Doktrin (der Text wurde nicht einmal ins Hebräische übersetzt). Die Haltung der Esperantisten, den (neutralen) Esperantismus nicht mit den Angelegenheiten des Judentums zu verbinden, war hingegen wohl die richtige Entscheidung.

Zamenhofs radikale Ablehnung jeglichen politischen Nationalismus und kulturellen Chauvinismus, einschliesslich des jüdischen, liessen ihn zu einem Theoretiker des Anationalismus und des ‚reinen Menschentums‘ werden.

Da im Werk Zamenhofs kaum einer von den zahlreichen jüdischen und nichtjüdischen Aktivisten, Philosophen und Ideologen ausserhalb der Espe-ranto-Bewegung genannt wird, kann man nur spekulieren, mit welchen von ihnen Zamenhof am ehesten geistig verwandt gewesen sein konnte.

A. Künzli, 2010

**Esperanto ekzistas dank’ al la judeco de L.L. Zamenhof kaj al la tiama cionisma debato pri la “juda demando”.** *Povas esti, ke la Esperanto-movado ne volis kaj ne volas ligi sian sorton kun la ‘juda demando’, kun kiu L.L. Zamenhof estis rekte kunplektita. La e-istoj tamen ne forgesu, ke Esperanto kaj la hillelismo/homaranismo aperis, krom kiel frukto de la internacilingva ideo mem kaj kiel rezulto de la komplika etna, religia kaj lingva situacio en Bjalistoko, dank’ al la judeco de L.L. Zamenhof kaj lige kun la “juda demando” kaj la cionismo de la tiama tempo. Per aliaj vortoj: Se Zamenhof ne estintus judo (“hebreo el la getto”), li verŝajne ne estus kreinta Esperanton, kiun li proponis al sia gento kiel novan lingvon de la judoj.<sup>1</sup> Same, la “interna ideo” de Eo kaj la tuta esperantismo mem ne ekzistus sen la hillelismo/homaranismo.<sup>2</sup> Bedaŭrinde, lia judeco ne estis sufiĉe adekvate honorita de la Eo-movado. La klopodo prisilentadi la judecon de Zamenhof, kiu havas longan tradicion en la internacia Eo-movado (kaj ekster ĝi),<sup>3</sup> principe havis neniun sencon, ĉar ĉiuj sciis, ke Zamenhof estas (aŭ estis) judo. La sisteme evitata menciado de la judeco de la Zamenhofaj familianoj ankaŭ ne povis eviti ilian perfortan pereon en la germanaj prizonoj kaj koncentrejoj de Pollando dum la holokaŭsto.<sup>4</sup> Se oni eventuale povas havi komprenon por tiu sinteno, ke en la periodo de la kruda antisemitismo, kiam la homoj amase estis mortminacitaj aŭ ofte eĉ fizike neniigitaj, oni evitis emfazi ilian judecon, nuntempe la ignorado de la judeco de Zamenhof, kiel tio kulmine okazis*

---

<sup>1</sup> La rekta pruvo por tiu supozo, aŭ aserto fontas en la sekva frazo el la letero de Zamenhof al Michaux de la 21-2-1905: “...Mia hebreco estas la ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tute al unu ĉefa ideo kaj revo – al la revo pri la unuiĝo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo...”

<sup>2</sup> Oni devas distingi la hillelismo de 1901, en kiu Zamenhof analizis la ‘judan demandon’, proponante “neŭtralan” lingvon kaj “neŭtralan” religion kaj novan landon por la judoj, de la hillelismo aŭ homaranismo de 1906, kiu konsistas el dogmoj por etika-morala sinteno.

<sup>3</sup> L.L. Zamenhof verŝajne eĉ mem kontribuis al la prisilentado de sia judeco, admonante la Eo-propagandistojn, ke ili ne devus tro emfazi ĝin.

<sup>4</sup> La holokaŭsto kaŭzis inter 5,6 kaj 6,3 milionoj da pereintaj judoj, krom tio sennombraj anoj de aliaj popolgrupoj. Dum en la komunismaj landoj judaj temoj estis ĝenerale forviŝitaj kaj tabuaj, en okcidenta Eŭropo, precipe en Germanio la politiko kaj scienco serioze komencis okupiĝi pri la historio de la holokaŭsto nur post la publike efikaj NS-procesoj okazintaj en la 60aj jaroj. En la Eo-movado pri judaj aspektoj lige kun Zamenhof kaj Esperanto okupiĝis ĉefe Maimon, Holzhaus, Kohen-Cedek, Dratwer kaj Lins (pri la reagoj en la Germana Eo-movado vd. [http://www.fenske.exequtive.de/ea/2006/ea2006\\_3\\_2.pdf](http://www.fenske.exequtive.de/ea/2006/ea2006_3_2.pdf), p.10), en Pollando precipe Banet-Fornalowa, Chmielik kaj Żelazny.

ekzemple en la kongresa rezolucio de la UK en la jubilea Zamenhof-jaro en Bjalistoko (2009)<sup>5</sup> kaj kiel tio okazas en diversaj amaskomunikiloj de polaj, germanaj kaj alilandaj Eo-organizaĵoj,<sup>6</sup> ne plu estas akceptebla aŭ tolerebla. Ankaŭ la konscia aŭ nekonscia prisilentado de ies judeco kontraŭ ties volo estas konsiderebla kiel rekta aŭ malrekta formo de antisemitismo. Judoj kaj judaj inventoj, ideoj kaj verkoj estas nuntempe tre estimataj kaj aprezataj en la mondo, do la e-istoj devus tre zorge flegi sian propran heredaĵon, kiu estis kreita de judo. Kaj se certaj Eo-historiistoj eĉ entute ne plu mencias la holokaŭston en siaj prelegoj kaj artikoloj, oni devas konsideri tion kiel grandkalibran skandalon sen precedenco.<sup>7</sup>

Lige kun la ‘juda demando’ necesas atentigi, ke Zamenhof ne estis polo. Estas tragedio, ke Zamenhof, kiu ĉiam kontestis kaj eĉ neis sian polecon (ekzemple en letero al la krakova LKK en 1912) kaj kiu konsideris sin “ruslanda hebreo”, sian denaskan lingvon la rusa kaj sian historian patrujon “Litovujo”, por eviti ĉian miskomprenon pri la propraj genta, lingva kaj landa identecoj, estis uzurpita kiel polo kun la intenco fari el judo kvazaŭ maljudon. Zamenhof ne estis kaj ne povis esti (etna) polo, sed fakte li estis ĉio alia ol polo; li povis esti nur judo, maksimume “filo de la pola tero”. Zamenhof eĉ ne apartenis al la polaj judoj, sed al la litovaj judoj (litvakoj). Malgraŭ tiuj identigaj distingo, kiujn la e-istoj neniam reale komprenis (aŭ volis kompreni), sed kiuj estas nepre farendaj. Pri la poloj Zamenhof kiel judo havis ambivalentan sintenon. En sia Hilelisma analizo de 1901 Zamenhof prezentis la konvinkon, ke judoj neniam povus fariĝi poloj, kaj ke en certaj polaj rondoj oni renkontas antisemitisman modelon. Multaj e-istoj, eĉ fakuloj pri historio, literaturo kaj lingvo, daŭre konsideras kaj verŝajne daŭre nomos Zamenhofon “pola” okulkuracisto, ĉu pro nescio de la faktoj ĉu pro la strebo elŝalti la judecon ĉe li.<sup>8</sup> La Eo-propagando kaŭzis, ke la mitoj, legendoj kaj duonveroj pri Zamenhof tiom profunde enradikiĝis kaj konserviĝis en la konscio de la homoj, e-istoj kaj nee-istoj, tiel ke eĉ multaj novaj sciencaj kontribuoj kaj kleraj klarigoj, kiuj estas speciale dediĉitaj al ĉi tiu temo, do probable ne helpus por ĝustigi la faktojn kaj korekti la falsan publikan percepton.<sup>9</sup>

A. Künzli, 2012

---

<sup>5</sup> Ĉi tiu rezolucio estis verkita de iuj konataj UEA-funkciuloj el Germanio, Francio, Usono kaj Ĉilio evidente sen la kunlaboro aŭ konsultiĝo kun polaj e-istoj (LKK aŭ aliaj).

<sup>6</sup> Karakterize estas, ke la retpaĝoj kaj la propagandaj informiloj de Germana Esperanto-Asocio, kiuj fanfaronas pri la avantaĝoj de Eo, radikale evitas ĉian mencion pri la juda deveno de la aŭtoro de Esperanto. Ankaŭ la nomon de Zamenhof mem oni vane serĉas en tiuj informaj materialoj (en la nova versio de [www.esperanto.de](http://www.esperanto.de) publikigita meze de decembro 2012, la nomo de Zamenhof estis finfine aldonita). Same en la informoj de koncernaj retpaĝoj de polaj Eo-organizaĵoj troveblaj sub [www.esperanto.pl](http://www.esperanto.pl) kutime mankas indiko pri la judeco de Zamenhof. Laŭdire, la Esperanto-redakcio de Pola Radio estis fermita interalie pro tio, ke Zamenhof estis judo (vd. <http://www.liberafolio.org/2006/judazamenhof>).

<sup>7</sup> Aktuala ekzemplo por tiu sinteno estas la prelego de la Eo-propagandisto U. Lins en Munkeno, junio 2012 (kiu poste estis publikigita en interreto kaj aperis en iu oficiala libro de la Bavara Ŝtata Biblioteko).

<sup>8</sup> Ekzemple en la ‘Enciklopedio de la Esperanto-Literaturo’ (Sutton 2008) oni mencias LLZ kiel “Polish Citizen”. En sia historio pri Volapük kaj Esperanto en Konstanz (Kuhn 2010) la aŭtoro ripetis la falson pri la “pola” okulkuracisto; tion faris ankaŭ la pola germanistino Renata Budziak en sia nekritika doktora disertaĵo pri Boudouin de Courtenay (Bamberg 1997), kie LLZ same estas prezentita kiel “pola” okulkuracisto (p. 139). Ankaŭ la retujo de ‘Espéranto France’ skribas pri LLZ kiel “médecin polonais” (<http://esperanto-france.org/esperanto>). Tipa nacilingva artikolo, kiu respegulas tiun saman sintenon, aperis en granda germana magazino (2009) sub <http://www.stern.de/panorama/google-feiert-esperanto-erfinder-doodle-zum-150-geburtstag-von-ll-zamenhof-1529451.html>. Ktp. ktp. ktp.

<sup>9</sup> Objektive prezenti la historiajn faktojn pri la judeco de L.L. Zamenhof celis fari ekzemple la Zamenhof-biografio de A. Künzli. Dum en la Eo-movado la verko estis malvarme akceptita de kritikantoj (ĉefe germanaj), kiuj negative aŭ malsimpatie recenzis ĝin, en judaj kaj judistikaj medioj de eksterlando (PL, IL) ĝi trovis pli da respekto kaj intereso (vd. [http://www.planlingvoj.ch/Repliko\\_Zamenhofbiografio](http://www.planlingvoj.ch/Repliko_Zamenhofbiografio)).